Den legal: BI-1007-88

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.º
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

4ª jaro Aprilo 1990 Numero 20 (2)

GRUPO ESPERANTO VALENCIA

Esperanto en Radio



En la foto, Andrej Pettyn, sekciestro kaj Milada Szwedo (maldekstre), kunlaborantino, dum Esperanta disaŭdigo ĉe Radio Polonia.



Bildeto
kun la anagramo
de Radio Havano Kubo.

NIA ĜENERALA JARKUNVENĈ

Okazis la 9-an de Marto, kaj post kunveno, nia ĝenerala jarkunsido. Ĉeestis ĝin 18 el niaj asocianoj.

Krom la kutimaj aferoj aprobendaj (Memuaro, financa bilanco de 1989, buĝetpropono por 1990, ktp.) oni, parte, renovigis la estraron, kiu nun restas tiel:

PREZIDANTO:	José Luis BRINGAS TELLECHEA
VICPREZIDANTO:	Tomás APRAIZ RIBERAS
SEKRETARIO:	Iñaki VELEZ ORTIZ
KASISTO:	Rafael PALAO PONS
VOĈDONANTOJ:	Ander AGUILAR SAN MILLAN
	Jesús Miguel GARCIA ITURRIOZ

Dum la kunveno tre bonvena estis sciigo ke la deficiton kiu rezultis de nia precipa aktivaĵo pasintjare (49-a Hispana Kongreso de Esperanto) feliĉe ni povis nuligi dank al ricevitaj subvencioj de vaskaj institucioj.


Specialan atenton ricevis ankaŭ la, ĉar necesa, elaborota - Biblioteka Regularo, cele plifaciligon de l' uzado de nia komuna libraro, kiu tago post tago pliampleksiĝas; enhavas nia biblioteko nun pli ol 1.000 ekz. (eniris ĝin la pasintan jaron pli ol 70 novaj libroj).

★★★★★★★

MUZIK-KASEDOJ















UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Ĉu vi interesiĝas pri la Esperanto-movado en monda skalo? Ĉu vi ŝatus kunlabori en la E-agado internacie? Jen vi havas ŝancon! ... Membriĝu en Universala Esperanto-Asocio (UEA)!!!

Fondita en 1908 havas nuntempe UEA -- multflankan agadkampon: kunordigi diversajn komunajn projektojn al asocio (naciaj kaj fakaj) kaj aliaj instancoj en la E-movado, proponi prioritatojn, ktp.; funkciigi diversajn agadojn, kiuj celas altigi la lingvan nivelon kaj kontribui al internacia kultura interŝanĝo: seminarioj, belartaj konkursoj, internacia ekzameno, koresponda servo, ktp.; reprezenti nin, esperantistoj, ĉe internaciaj organizoj (ekz. UN, Unesko, Eŭropa Komunumo); eldonado de tre valoraj kaj interesaj E-periodaĵoj, libroj, ktp.; organizi ĉiujare la Universalan Kongreson de Esperanto, ktp.

PLIAJ INFORMOJ VI MEM LEGU EN LA APUDE SENDITA FALDFOLIO!

Entenas la strukturo de UEA landajn Esperanto-asociojn (aligitaj membroj) kaj fakajn, sed ĝia efektiva bazo kaj precipa financa subteno restas la individuaj membroj, kaj plimultigon da ili -- celas tiu ĉi varbokampanio.

MUZIK-KASEDOJ

Jen sekve listo de la plej bonaj muzik-kasedoj ĝis nun aperitaj esperante. Apartenantaj al diversaj muzikstiloj - (populara, rokmuziko, folklora, ktp.) vi ĉiam trovos spritajn kaj interesajn tekstojn, bonan prononcon, varian kaj kvalitajn muzikaranĝojn. Certe ili surprizos vin ... konentige. Petu ilin ĉe la Grupejo.

- "Tute negravas". AMPLIFIKI. (+ tekstokajero) ..... 1.200 ptoj
- "Baf!". Div. kantistoj. (+ tekstokajero) ..... 1.200 "
- "62 minutoj". PERSONE. (+ tekstokajero) ..... 1.300 "
- "Kajto". KAJTO. (+ tekstokajero) ..... 1.250 "
- "Ora team'". TEAM. (+ tekstokajero) ..... 1.300 "

- "Liza kaj Paŭlo". Sondramo por stimuli la studadon de Esperanto.-Tekstokajero inkluzivita- ..... 800 ptoj

aldonendaj sendokostoj

Esperanto en Radio




Festado de la 25-jariĝo de la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino.
(19 Dec. 89)

La radioprogramoj en Esperanto estas jam tradicia ero en la E-kulturo. Estas sufiĉe multaj la radiostacioj kiuj ankaŭ uzas nian lingvon en siaj internaciaj elsendoj; plimulte kiel vi povas vidi en la dekstra tabelo estas nur kelkminutaj programoj, sed ĉiam se la intereso de la aŭskultantoj tion evidentigas la pro-- gramoj ampleksiĝos -pli da tagoj, pli da minutoj-. Ne temas nur pri novaĵoj aŭ informprogramoj, sed plejofte ankaŭ pri kulturaj programoj. Plej gravaj estas Pola Radio kaj Radio Pekino, kiuj - ĉiutage dissendas pli ol du horoj en la internacia lingvo.

Dum 1990, aldone al la ordinaraj, okazos eksterordinaraj esperanto-elsendoj, en la tagoj: 16a de aprilo, 1a de majo, 14a, 15a kaj 16a de aùgusto, 1a de novembro, 8a, 24a, 25a kaj 26a de decembro, vespere je la horo 20a UTC (somere: h. 19a)

Radio Vatikana



La tri kulpuloj de la esperanto-programo de RV en serioza sinteno. De maldekstre Pastro Carlo Musazzi, barnabita; S-ro Carlo Sarandrea; Hatto von Hatzfeld, saleziano.

Equipo actual del Programa Esperanto.

L'equipe de la section espéranto.

RADIO-PROGRAMOJ EN ESPERANTO

Vi trovas ĉi-sube ĉiujn aktualajn indikojn laŭ la mezeŭropa tempo. Por eltrovi la ĝustan tempon en via regiono, konsultu la mapon de tempozonoj en „LA JARO". Por havi nun la grenvičan tempon, subtrahu unu horon. Se ne estas aliaj indikoj, la frekvencoj estas en kilohercoj kaj la ondolongoj en metroj. Plejparte temas pri kurtondaj frekvencoj. → ĝisdatigita 9001/vintre

stacio	tago	horo	kilohercoj	metroj
Varsovio (Radio Polonia)	ĉiutage	6.00- 6.30	9675, 7270, 5995, 1503	31,01; 41,27; 50,04; 200,00
Esperanto Redakcio		12.00-12.25	11840, 9525, 5995, 1503	25,34; 31,50; 50,04; 200,00
Poŝtkesto 46		16.30-16.55	11815, 6095	25,39; 49,22
PL-00950 WARSZAWA 1		18.30-18.55	9540, 7285, 6135	31,45; 41,18; 48,90
		21.30-21.55	9525, 7145, 7125	31,50; 41,99; 42,11
		22.30-22.55	7285, 7270, 7125, 6135	41,18; 41,27; 42,11; 48,90
			6095, 5995, 1503	49,22; 50,04; 200,00
Bern (Svisa Radio Internacia)	lunde		9535, 6165, 3985	31,46; 48,66; 75,28
Esperantofako	jaŭde	por Eŭropo		
CH-3000 BERN 15	sabate	14.30-14.40	La elsendoj por ekster-eŭropaj regionoj okazas merkrede kaj sabate per direktitaj antenoj okfoje. Petu specialan faldfolion!	
Vieno (Aŭstra Radio)	dimanĉe	5.05- 5.30	6155 Eŭropo	48,74
ORF Esperantoredakcio			15410 Proksima Oriento	19,47
A-1136 WIEN	dimanĉe	14.05-14.30	13730, 6155 Eŭropo	21,85; 48,74
			15430 Malproksima Oriento	19,44
			21490 Okc. k S.Okc. Afriko, S.Okc. Eŭropo	13,96
Vatikano (Radio Vatikana)	dimanĉe		1a Eŭropa Programo	
Esperantoredakcio	kaj	21.00-21.10	1530, 6190, 6248, 7250, 9645	196; 48,47; 48,00; 41,38; 31,10;
I-00120	festotage		Afrika Programo	
CITTÀ DEL VATICANO			1530, 9625, 11700, 15120	196; 31,17; 25,64; 19,84
	jaŭde	7.00- 7.15	2a Eŭropa Programo	
			1611, 6248, 7250, 9755, 11715	186; 48,00; 41,38; 30,15; 25,61
Romo (Radio Roma RAI)	sabate	21.00-21.20	7275	41,24
Esperantoredakcio			11800, 9710	25,42; 30,90
C.P. 320, I-00100 ROMA				
Zagrebo (Radio Zagreb)	dimanĉe	23.45-24.00	1125, 1134, 1143	266,4; 264,70; 262,00;
Eo-redakcio Jurišičeva 4,				
YU-41000 ZAGREB				
Pekino (Radio Pekino)	ĉiutage	21.00-21.30	9500, 9965, 7470	31,58; 30,10; 40,16
Esperantofako		por Eŭropo		
BEIJING		23.30-00.00	9480, 11515	31,65; 26,05
		por Latin-Ameriko		
		12.00-12.30	9480, 6955	31,64; 45,10
		por Japanio kaj Koreio		
		14.00-14.30	11650, 15165	25,70; 19,78
		por Sud-orienta Azio		
Rio de Janeiro (Brazila Spiritisma Federacio)	dimanĉe	23.30-23.45	1400	214
av. Passos 30				
BR-20000 RIO DE JANEIRO ZC 58 Brazilo				
Sorocaba (Rádio Clube de Sorocaba)	dimanĉe	1.00- 2.00	1080	278
Eo-Redakcio, rua de Penha 455				
BR-18100 SOROCABA SP, Brazilo				
Radio Esperanto Parizo	vendrede	19.00-20.00	89,5 MHz	en MF(UKW)
145, rue Amelot				
F-75011 PARIS, Francio				
Radio Budapest	dimanĉe	10.50-11.00	69,38 MHz	en MF(UKW)
KNAF Eszperantó			aliregionaj frekvencoj laŭ FM-reto de MRT3	
H-1800 Budapest				
Tallin (Estona Radio) Esperanto-fako	jaŭde	22.20-22.30	1035; 5925	290; 50,63
SU-200100 Tallin	dimanĉe	10.20-10.30	1035, 5925	290; 50,63
Estonio, Sovetio				
Córdoba, Hispanio	sabate	12.00-12.20	94,3 MHz	en MF (UKW)
Radio Havano	dimanĉe	9.00- 9.20	11835 okc. Nord-Ameriko, pacifika Azio	25,35
Kubo		18.00-18.30	15340, 15300, 15285, Ameriko	19,56; 19,61; 19,63;
Esperanto-Fako			11820, 11760, 11725	25,38; 25,51; 25,59;
Poŝtkesto 7026		19.30-20.00	17800, 15285, 11800 Eŭropo kaj	16,85; 19,63; 25,42
		23.00-23.20	17800, 15285 Mediteraneo	16,85; 19,63
		23.30-00.00	11970, 11950, 11910, 5985 Ameriko	25,06; 25,10; 25,19; 50,13;
Radio Vilnjuso	marde	00.23-00.28	11770, 12060, 15180, 17665,	25,49; 24,88; 19,76; 16,98;
Radio Vilnius Esperanto			17690	16,96
SU-232674 Vilnius, Litova SSR	jaŭde	23.53-23.58	6100, 666	49,18; 450,45
Radio FMR	merkrede	13.00-13.30	89 MHz	en MF (UKW)
Eo-redakcio, 9 bis av. Frédéric Estèbe	sabate	10.30-11.00	89 MHz	en MF (UKW)
F-31200 TOULOUSE, Francio				

© MONATO internacia magazino sendependa, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Unu el la multaj bonaj ideoj de MONATO!

Ĉu vi konas sinjoron Bojkot?

Esperantaj vortoj devenantaj de propraj nomoj.

Ekzistas amaso da Esperantaj vortoj, en kiuj kaŝiĝas la nomo de persono, de lando, rivero k. s. Kompreneble tio havas historiajn kaŭzojn; kaj kiu konas tiujn, vidas multajn vortojn, kiujn li ordinare uzas kiel malnovajn monerojn, brilantaj en aparta lumo. La sekvanta listo estas nur malgranda kolekto el la granda provizo da tiaj vortoj.

AKADEMIO: La placo, sur kiu Platono instruis siajn lernantojn, havis la nomon »Akademia« laŭ antikva heroo *Akademos.*

AMERIKO: Laŭ la itala vojaĝanto *Amerigo* Vespucci, kiu la unua priskribis partojn de la nova kontinento, ĝi ricevis sian nomon. Amerigo cetere estas alia formo de la nomo Emeriko, kaj tiu lasta signifas Henriko. Sekve: Ameriko = Henriklando.

AMONIAKO: Tiu gaso estas produktebla el salpetro, kiu en la Antikva Epoko estis trovita en la oazo de la egipta dio *Ammon.*

ARLEKENO: La nomo de tiu burleskulo devenas de la franca grafo *Hernequin,* kiu mortis jam 882 en Boulogne kaj estis laŭ la tradicio tre senbrida sinjoro.

ARTEZA: Artezaj putoj, kiuj estas precipe en oazoj arte kreataj kaj el kiuj la akvo mem elŝprucas fontane, estis unue boritaj en la regiono de *Artois* (Francujo).

BAJONETO: Pikaj kaj tranĉaj armiloj meteblaj sur la tubon de fusiloj estis fabrikataj jam en la 17-a jarcento en *Bayonne* (Francujo).

BEGONIO: La botanikisto Michael *Begon* enkondukis tiun ŝatatan potplanton el la tropikaj landoj.

BOJKOTO: La irlanda bien-administranto *Boycott* estis tiom malsimpatia ulo, ke neniu plu interkomunikis kun li aŭ aĉetis de li, nek vendis al li, tiel ke li devis elmigri (en 1880).

CARO: La nomo de la roma politikisto Caius Julius *Caesar* transformiĝis en la diversaj lingvoj al Czar, Kaiser k. a. Cetere »Caesar« estis lia kromnomo, kaj ĝi signifas »kalvulo« (senharulo).

DALIO: Tiu ĉi planto estis trovita de la sveda botanikisto Andreas *Dahl* en Meksiko (ĉ. 1780).

DERBIO: La grafo Edward *Derby* fondis (ĉ. 1780) tiun ĉi ĉevalkonkurson, kiu okazas ĉiujare la merkredon antaŭ aŭ post pentekosto en Epsom.

DRAKONA: La Atena leĝdonanto *Drakon* en 621 a. Kr. publikigis leĝaron, pri kiu oni diris, ke ĝi estas »skribita per sango«.

GAMAŜO: Piedvesto, fabrikita komence el ledo el *Gadames,* urbo en norda Afriko.

GILOTINO: Ekzekutmaŝino, rekomendita en 1789 de la franca kuracisto *Guillotin.*

KRAVATO: Laŭ la koltukoj portitaj de la *kroatoj,* kiuj en la 30-jara Milito helpis dezertigi Germanujon.

KUPRO: Tiu metalo estis trovita en la Antikva Epoko sur la insulo *Kypros.*

LINĈI: La farmisto *Lynch* fondis en la 18-a jarcento popolan justecon, por subpremi la banditojn, kiujn la ordinara polico ne sukcesis kapti.

MUSLINO: Tiu delikata ŝtofo estis unue teksita en la urbo *Mosul* apud la rivero Tigris.

NIKELO: *Nickel* estas la ŝercnomo, per kiuj germanaj ministoj nomas mistifikantan koboldon. Kiam oni unuafoje trovis tiun metalon, oni kredis, ke ĝi estas arĝento. Sed kiam poste oni ekkonis la eraron, oni diris: „La Nickel mistifikis nin!", kaj la nomo transiris al la metalo.

NIKOTINO: La franca diplomato Jean *Nicot* kunportis en 1560 el Portugalujo la tabakplanton al Parizo kaj rekomendis ĝin kiel kuracilon.

PANIKO: Laŭ la grekaj mitoj la apero de la arbara dio *Pan* ektimigis la homojn.

PASTELO: Nekonata franca sukerajisto eltrovis tiujn medikamentajn bombonojn, kiujn la florenca̍no *Pastilla* ĉ. 1600 enkondukis en Italujo.

PERGAMENO: La arto, prepari bestohaŭton por skribado, estis eltrovita kaj ĉefe praktikita komence en la malgrandazia urbo *Pergamon.*

PERSIKO: La hejmlando de tiu bongusta frukto estas *Persujo.*

PRALINO: Tiu ĉokoladbombono estas eltrovita en la 17-a jarcento de la kuiristo de l' franca marŝalo Plessis-*Praslin.*

ŜANDVIĈO: La *Earl of Sandwich* (18-a jarcento) estis pasia ludanto. Por ne esti devigata, interrompi la ludon pro manĝo, li ordonis, ke oni prezentu al li kaj liaj gastoj ĉe la ludtablo senkrustigitajn blankajn pantranĉaĵojn kun surmetita viando.

SARDELO, SARDINO: Fiŝoj, iam kaptitaj ĉe la insulo *Sardinio.*

SAKSOFONO: Tiun kupran blovinstrumenton inventis en 1840 la belgo Adolphe *Sax.*

ŜOVINISMO: Laŭ persono *Chauvin* en la franca komedio »La cocarde tricolore« (1831), kiu montras fanatikan patriotismon.

SILUETO: La franca financministro de Ludoviko XV-a, *Silhouette,* estis pro siaj ŝparigaj metodoj tiel malpopulara, ke oni laŭ li nomis la arton, fari la bildon de persono ne per peniko kaj farboj, sed per paper-eltondo.

TRAMO: La unuajn tramvojojn konstruis la anglo *Outram.*

TRIKOTO: Laŭ la nomo de la franca urbo *Tricot.*

TULO: Tiu retosimila teksaĵo estas eltrovita en la sudfranca urbo *Tulle.*

El la verko "Miru, Pensu, Ridu !" de Paul Bennemann.

ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO (A. E. U.)

ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO

O F E R T A S A L V I :

---

* La Diskon LP (longadaŭro) KOSMO-INFANO de la malaga muzikisto SOLO, kun modernaj kaj belaj kanzonoj en esperanto. Surdiskigita per nova digitala sono-sistemo DAT, kiu ebligas la plej bonan sonon.

Prezo: 1.200,- ptoj. (Disko + teksto + sendo)

* La Libron PANDEMONIO, verkitan de junaj hispanaj verkistoj, kun riĉaj literaturaĵoj premiitaj ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA.
Rakontoj de Georgo Kamaĉo, Alberto Franko, Ksavero Moleono, M.Angelo Sanĉo, kaj aliaj

Prezo: 700,- ptoj. (Libro + sendokostoj)

* 1-an INTERNACIAN RENKONTIĜON kaj

8-an ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO en Torrox (Málaga) de la 7a ĝis la 14a de oktobro 1990. Loĝigo kaj tri manĝoj en tre bela Restadejo apud la plaĝo, en 2,3,4,5,6 kaj 7-litaj ĉambroj, ĉiuj kun necesejo kaj duŝejo.
Venu kaj feriu en Torrox, vilaĝo de la Suna Marbordo, kun, laŭdire, la plej bona klimato el Eŭropo.

Prezo por la tuta semajno: 14.000,- ptoj.

Informoj / Mendoj / Pagoj ĉe:

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Poŝtkesto 864
E-29080 MALAGA